

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Decembro 2016

(48a jaro)

N-ro 173

Esperanto Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ

Al Museo
Postale e Telegrafico
della Mitteleuropa
piazza Vittorio Veneto, 1
Trieste

L'esperanto in cartolina
Storia ed evoluzione grafica delle
cartoline esperantiste

Giovedì
8 settembre 2016
alle ore 17

Posteitaliane

La Sua presenza sarà particolarmente gradita

**Invitilo al Esperanto-ekspozicio
en la Poŝta kaj Telegrafa Mezeŭropa Muzeo
Trieste/Italio 2016**



Haruja Maekawa kompletigis la liston pri la japanaj poŝtaj Esperanto-stampoj, kun klarigoj en la japana. La numeroj respondas al tiuj en nia stampo-katalogo. Ni montras la 4an paĝon. Klarigojn pri ili ni jam notis en nia LVL.

Tamen mallonge denove pri ili:

47	La 100a Japana Esperanto-Kongreso	Tokio	2013 10 12~15
48	La 62a kongreso de Kansajaj E-istoj	Himeji	2014 05 31~06 01
49	La 101a Japana Esperanto-Kongreso	Obama	2014 10 11~13
50	La 63a kongreso de Kansajaj E-istoj	Kyoto	2015 06 20~21
51	La 102a Japana Esperanto-Kongreso	Sendai	2015 10 10~12
52	La 64a kongreso de Kansajaj E-istoj	Sakai	2016 06 18~19
53	La 103a Japana E-Kongreso	Oumihaĉiman	2016 10 08~10

	大会名	開催地	使用局	使用期間
47	第100回日本エスペラント大会	東京	葛西	2013. 10. 12~15
48	第62回関西エスペラント大会	姫路	姫路	2014. 05. 31~06. 01
49	第101回日本エスペラント大会	小浜	小浜	2014. 10. 11~13
50	第63回関西エスペラント大会	京都	左京	2015. 06. 20~21
51	第102回日本エスペラント大会	仙台	仙台中央	2015. 10. 10~12
52	第64回関西エスペラント大会	堺	泉北	2016. 06. 18~19
53	第103回日本エスペラント大会	近江八幡	近江八幡	2016. 10. 08~10

La 90a kongreso de Esperantistoj en Kjuŝu, 2016

Sub la moto: Pacon, Amikecon, Interkomprenon



Teksto en blanka, nigra en la japana

Bildo: Ponto sur stelo

Koloroj: verda, griza, ruĝbruna

Nominalo: 52 sur blanka fono

82 sur blua fono

(Folio kun po 5 ipm 52 enoj kaj 82 enoj)

La kongresanoj ricevis donace tiun pm-serion.

Informis pri la eldono: Haruja Maekawa

Grava anonco!

Estas finpretigita kaj aktualigita la „Poŝtmarka Katalogo“, ne plu presita surpapere (tro kosta!) sed enmetita en KD-on, kompaktan diskon. En la Katalogo aperas informoj pri ĉiuj pm-oj, oficialaj aŭ individue eldonitaj, ekde la Bavaria kun talono - 1911 - ĝis 2015 inkluzivita. Pri la unuopaj pm-oj aperas ĉiuj eblaj detaloj, sed kelkaj priskriboj ne estas kompletaj pro manko de informoj fare de la eldoninto (tio koncernas nur la individuajn aŭ personigitajn pm-ojn). La esploro-elfarado de tiu granda laboro estas s-ro Giacomino Martinez, kiu jam estas prilaboranta la glumarkan, stampan, tutaĵan katalogojn. Dankon tamen mi ŝuldas al nia redaktoro Rudolf pro lia atenta reviziado kaj konsilado.

Nu, la prezo estas tre malalta: 5 eŭroj plus elsendokostoj. Mi atendas viajn mendojn: por kromaj detaloj mi restas je via dispono.

Elda Doerfler

FRAME STAMP

★
La 90a Kongreso de Esperantistoj
en Kjuŝu 2016
Pacon. Amikecon kaj Interkomprenon!
*** 第90回九州エスぺラント大会 2016 ***

フレーム切手

JP 日本郵便
POST

第90回九州エスぺラント大会2016
La 90a Kongreso de Esperantistoj en Kjuŝu 2016

NIPPON 52

NIPPON 82

切手と写真部分を郵便物に貼って、ご利用いただけます。
写真部分だけでは、切手としてご利用いただけません。
郵便料を納付のためにこの切手をご利用の場合、写真部分に消印がかかることがあります。

© 2016 日本郵便株式会社

Jen folio kun la markoj



**La 103a Japana Esperanto-Kongreso
en Oumihaĉiman, gubernio Ŝiga
2016, 8a-10a de Oktobro**

**Kongresa temo:
Lago Biua, Homo. Harmonio**



Laŭvice: Nisino, Maekawa, Mori (helpanto), Sasanuma, Hiyama, Onishi, Hotta, Morikawa, Kudo, Kimoto
(fotita ĉe kunveno de LKK)

**Jen la Loka Kongresa Komitato
(kun nia Haruja Maekawa sube maldekstre)**

La kongreso okazis en la lernejo *Vories Gakuen*, sub aŭspicio de la Ministerio de Edukado kaj altrangaj guberniaj aŭtoritatuloj. Aliĝis pli ol 400 personoj kaj venis gastoj i. a. el Vjetnamio, Koreio kaj Kamboĝo.

En la kongresejo troviĝis portempaj poŝtoŭficejo kaj poŝtmarkovendejo, kiuj funkciis dum ĉiuj kongresaj tagoj.

Unuafoje japana E-kongreso okazis en la gubernio Ŝiga.
Aperis vico da individuaj E-pm kaj poŝta E-stampo.

Inter esperantistoj la urbo Ocu en sama gubernio aparte konatiĝis en somero 1965 kiam tie okazis TEJO-kongreso. Okaze de ĝi ĉeestis pluraj esperantistaj paroj de eŭropa kaj japana deveno, kiuj poste iĝis interkulturaj familioj kun denaske esperantlingvaj infanoj.

Inter alie la japan-germanaj familioj Ulrich Lins kaj Joshie/Dieter Kleemann.





La kongresa emblemo

La 103a Japano Esperanto-Kongreso en Oumihaĉiman, gubernio Ŝiga 2016, 8a-10a de Oktobro

La poŝta stampo:

Portempa poŝtejo en lernejo Vories GAKUEN
en urbo Oumihaĉiman 8-10 10 2016

Bildo: Granda „H“ signifas *Homo Harmonio*
kun lago Biua

Prikongresa teksto en la japana kaj en E.



Kongresa memorkoverto, poŝte sendita



**La 103a Japana Esperanto-Kongreso
en Oumihaĉiman, gubernio Ŝiga
2016, 8a-10a de Oktobro**

La individuaj kongresaj Esperanto-poŝtmarkoj



Aperis 6 sambildaj poŝtmarkoj

Nominaloj: 52 enoj en ora kadro, 82 enoj en blua kadro, 82 enoj sur blanka fono, 82 enoj en ora kadro, 82 enoj en vertikala rektangulo en ora kadro kaj 92 enoj en viola kadro.



La filatela klubo TUTMONDO en Aŭstrio

En aktuala reta hejmpaĝo de la klubo i.a. legeblas:

...Unser Verein wurde am 23.04.1954 in Salzburg gegründet. Der Vereinsname TUTMONDO ist der Kunstsprache Esperanto entlehnt und bedeutet soviel wie "ganze Welt". Einige der Vereinsmitglieder waren zur damaligen Zeit eifrige Esperantisten und so kam es zu dieser Namensgebung....

(...Nia klubo fondiĝis 23.04.1954 en Salzburg. La kluba nomo TUTMONDO fontas el la artefarita lingvo Esperanto... Kelkaj niaj tiutempaj klubanoj estis fervoraj Esperantistoj...)

La klubo ankoraŭ nun ekzistas (eble sen E-istoj) kaj estas tre aktiva. Okaze de ĝia 50jara ekzisto aperis en 2004 jubilea ipm kun la kluba nomo en la marko (supre maldekstre).

Akompanis ĝin dua ipm okaze de interŝanĝtago 10.10.2004.

Tria al ni konata TUTMONDO-ipm aperis por la „interŝanĝtago“ 9.10.2005

Klarigo BSV: Briefmarkensammleryerein (Filatela klubo)



Salutkarto el la 83a itala E-kongreso (250 ekzempleroj)
Grafikisto: V. Capecci





**83a Itala Kongreso de Esperanto
en Frascati – Romo**

Dato: 20 08 2016 (16a – 20a horo)

Loko: Poŝta giĉeto en Frascati

Mezuro: 38x32 ovala, presita

Teksto: en la itala kaj en E

Partoprenis ĉ. 250 personoj

La salutkarton kun la stampo sendis nia Elda DOERFLER. Dankon al ŝi!


**Esperanto-filatela ekspozicio
en la korea havenurbo POHANG
16 – 18 10 2006 en la ĉefpoŝtejo**

La stampo devus ricevi en la korea vico de nia
katalogo la numeron 5

Mezuro: 29 mm Koloro: viola



En niaj LVL 144 kaj 148 videblas detaloj pri
E-pk-serio dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto en Koreio.
La tekstojn en la poŝtkartoj tradukis el la korea s-ano Kang Hon-gu.
Organizita movado naskiĝis tie en 1920.
Eble LKK de la sekvontjara UK havas same bonan ideon kiel tiu de Nitra:
okazigi Esperanto-filatelan ekspozicion por prezenti la E-filatelon korean.



Tiuj ĉi du tutaĵo-pk-oj
el Koreio bedaŭrinde
mankas en niaj kolektoj.
Tamen: Posedas ilin nia
amiko SUZUOKI!
Kaj eble Kang Hon-gu.

**Jubilea E-pk
125 Jaroj Esperanto
1887-2012**

**Komuna E-Kongreso
Japana kaj Koreia
2011**



Kamuflitaj E-bildkartoj (El letero de J.R. Piton) Franca ministro Bienvenu-Martin kun Eo-teko (1905)



„... Mi foje trovas Esperanton
en neatenditaj lokoj. Ĉifoje, danke al iu
vendisto, mi eksciis pri tiu ĉi detaleta
en jena politika karto,
vendata de jaroj en Delcampe:
Kun laŭroj sur la kapo
kaj apud Marianne (la Respubliko),
ŝtatprezidanto Loubet.
Kaj mi identigis el la kabinet-listo,
per komparo al fotoj de Vikipedio,
plurajn el la ministroj.
Inter ili, tiu kun atlaso sur la kapo,
Jean Baptiste Bienvenu-Martin.
Rimarku, kion li tenas sub la brako!
Socialisto, li akceptis Zamenhof-on
kaj donis al li la Honor-Legio-medalon en la 29-07-1905...”




La titolo de la karto: "Post la ferioj. La reveno de la Ministraro".
Bildo desegnita Okt. 1905 (kvankam tio aspektas 1906),
karto uzita en Decembro! La kabineto daŭris nur ĝis Marto 1906.

Kamuflitaj E-bildkartoj (El letero de JR Piton)

Poŝtkartoj estas preskaŭ senfinaj pri surprizoj. Jen karto, kun "laborista anonceto" de 1906 de franca ŝtatprezidanto Loubet, fine de lia 7-jara mandatperiodo. Plia por tiu nia serio de diskreta kaj neatendebla mencio pri Esperanto.

Sur la karto oni vidas akvarelan bildkarton de Émile Loubet (1838-1929). Franca prezidanto inter 1899 kaj 1906, li estis tre populara celo por la francaj bildkartaj karikaturistoj.

En la karto oni vidas "anonceton" de "laborserĉanto", kiu tekstas jene:



"Junulo tre vojaĝamanta, parolanto de ĉiuj lingvoj, inkluzive de la agraha kaj de Esperanto, serĉas ajnan laborpostenon. Proponojn oni sendu al la abato Gueule de Mazenc (Drôme)"

(tie ĉi vortludo - Loubet havis kastelon en La Bégude-de-Mazenc - abbé = abato, gueule = faŭko)

JRP



Pariza E-a bildkarto „Stela-Concert-Esperanto“
kun portretoj de i.a. F. Blangarin („Fi Blan Go“) kaj „RIDETULO“



Kaŝita noto en desegnaĵo:
„Publicite Esperanto
H H PARIS“



Li pereis en la
„Marne-batalego“
de la Unua Mondmilito.
en Decembro 1914



Homo kun revuo Esperanto sur strato en Bar-sur-Aube



Jen bildkarto kun la sama homo kun sama E-gazeto

Sin prezentas

Franz-Georg RÖSSLER
nia kluba amiko ekde Nitro 2016



„...Junaĝe mi estis serioza poŝtmarkkolektanto. Mi konis ĉiun germanan poŝtmarkon kaj klopodis starigi apartajn kolektojn laŭ propraj reguloj. Pri profesiaj poŝtmarkistoj kaj enviindaj erudiciegaj amatoraj specialistoj mi nenion sciis. Kvankam mia poŝtmono apenaŭ sufiĉis por regule atingi mian amikinon telefone, mi foje eĉ aĉetis poŝtmarkojn por la albumoj.

La inklino daŭris, ĝis ankaŭ tiu mondo fariĝis ne plu superrigardebla. De tiam kuŝas miaj albumoj en ŝranko kaj nur ĝuas renversiĝon, kiam mi ritme senpolvigas post jaroj la tuton. Kaj tiam mi regule plendas pri la vivo, kiu ne lasas la tempon por funde sekvi valorajn vojojn. Tial akumuligis preskaŭ sen plua tuŝo kolektoj pri Germanujo diverstempa, pri Vatikano, religio, muziko, Liĥtenŝtejno, k. a. Mi timas, ke ili perdiĝos, kiam mi mem ne plu scias pri ili.




Pro nia okupiĝo pri bildfarado mi kun mia edzino Rita Rössler-Buckel jam frue konatiĝis kun la fako "Poŝtarto", kiu pritraktas ne la kleran kolektadon kaj prezentadon de poŝtmarkoj, sed la artecan aranĝon de poŝta tutaĵo mem. Iam ni eksciis, ke ankaŭ Esperantistoj kontribuas al tio. Okazis tio aparte pere de specimenoj kaj praktikaj ellaboraĵoj de d-ro Wolfgang Günther.

Por la Germana Esperanto-Kongreso 2015 en Hameln ni pretigis kvar koncernajn bildtabulojn sub la titolo

- "RRB-FGR: Esperanta poŝtarto I" kun aparta loka apendico kaj daŭrigis en la UK de Nitro 2016 per la ekspozicio
- "Esperanta poŝtarto II" Nitra / Slovakia Filatela Federacio / UK 2016 Ekspozicio "Slovakio kaj Esperanto" en la Urba Teatro Nitro, 25. -29. 7. 2016

Tie admirante la apudajn kolektojn, ree nin ravis la ideo pri "pura" kolektado. Sed perfektecon alstrebi en nia aĝo nur estus vana klopodo.

Rössler Franz-Georg“



1909 - Otto DIX lernis Esperanton en la Laborista E-klubo en Gera. Poste li studis en Dresden kaj tie estis membro de loka E-klubo. Li militservis kaj sendis multajn poŝtkartojn kaj leterojn en E al s-ino Helene Jakob en Dresden. Tiuj nuntempe videblas en muzeoj de urboj Stuttgart, Gera kaj Chemnitz.

La regantoj de la „Tria Regno“ (1933-1945) proklamis la artverkaĵojn de DIX „Fiarto“ kaj forigis la bildojn el muzeoj, eĉ bruligis multajn.

Multaj pluaj detaloj legeblas en la interreto. I.a. ĉe <http://esperanto-aalen.de/biblioteko/artikoloj/OttoDix.htm>

Mondregistaro Poŝto



Oni vendas unu "poŝtmarkon" kontraŭ 1 usona dolaro.
Ĉe Thomas Circle, NW
Washington, D.C
(Temas pri preĝejo, videbla ankaŭ per GOOGLE EARTH)
Folio havas 35 markojn.
„Nominalo“: 1 MONDO
Krom la UN-lingvoj, supre de la pm troviĝas "Mondregistaro Poŝto"

La pm estis produktitaj en 1981 "por faciligi la poŝton inter Ĉinio kaj Tajvano“.



La dua de tiuj fantaziaĵoj montras „nominalon“ de 50 CENDOJ.
Dekstre en la marko, la noto: ONDREGISTARO / POSTO (sen M)

Por ĉionkreduloj eblas, akiri ankaŭ „Pasporton“ de la „Mondregistaro“.

Atentigis pri tio nia J. R. Piton. Dankon al vi!



**101a UK en Nitra,
Slovakio 2016**

**Bildo: la kongresa emblemo,
surfone la Kalvaria monteto**

**memglua, sendenta
54x31**

**Koloroj: nigra kaj verda
sur blanka**



101a UK en Nitra, Slovakio 2016

**Bildo: la kongresa emblemo
memglua, sendenta**

**Koloroj: nigra kaj verda sur blanka
Mezuro: 35x60**

Trovita sur kongresa bildkarto

89a SAT-kongreso

**2016 16-23.07 en Herzberg
memglua, sendenta**

Bildo: Kastelo en Herzberg

Koloroj: ve, ru, ni

Du mezur-variaĵoj:

2x3 cm (Prezo € 0,10)

7x5,5 cm (Prezo € 0,25)

Desegnis: Peter Zilvar





ELF-AREK

*Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj*



Prezidantino: S-ino Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 TRIESTE
>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto: IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 –

Banco Posta BIC: BPPIITRRXXX. Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

Nia retpaĝo: <http://www.kolektado.esperanto.cc/> - Specialan dankon al la lerta prizorganto James Rezende Piton!

Karaj Geliganoj,

jam antaŭ ni staras decembro, la lasta monato de ĉi-jaro, kaj kutimo estas iom retrorigardi kun aparta atento al la laboro farita. Nia ELF-AREK sufiĉe bone fartas, nunjare akiris eĉ tri novajn membrojn; videbla ĝi estis dum la UK en Nitra, dum kunvenoj kaj ekspozicio. Pri ĉio ĉi mi – malmodeste – tre fieras. Konsentojn mi ricevis ankaŭ dum la itala kongreso en Frascati (eksa-ligano ja ree kotizis!) kaj efikan propagandon sukcesis fari dum la stampo-tago.

Do, malrapide, malrapidege, sed konstante ni progresas: *eĉ guto malgranda, konstante frapanta, traboras la monton granitan* – tion diris nia Majstro kaj ni sekvu lian konsilon. Ni elkore bonvenigu en niajn vicojn S-rojn Franz-Georg Rössler el Germanio, Maurice Caron el Francio kaj Rino Mignani el Italio.

Mi kaptas la okazon, por rememori ke baldaŭ oni devos renovigi la membro-kotizojn kaj konstanta pago kaj kunlaboremo nepras por la agad-daŭrigo de nia ELF-AREK. Tre kore mi dankas tiujn fidelajn liganojn kiuj ĉiam akurate renovigis sian pagon kaj samtempe, kun ega bedaŭro tamen, mi informas tiujn, kiuj ne pagis dum la jaroj 2015 kaj 2016, ke ili ne plu ricevos LA VERDA LUPEO-n, tio precipe pro respekto al la personoj kiuj regule, jam de multaj jaroj, subtenas sian ligan. Filatele vin salutas

Via Prezidanto



**Feliĉan novan jaron en sano kaj paco
por vi ĉiuj!**

Elda Doerfler kaj Rudolf Burmeister